

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond pri Jacques Mühlethaler la pilgrimanto de la Paco.

En decembro mi rakontis al vi kiel komenciĝis la porpaca kariero de la ĝeneva librovendisto Jacques Mühlethaler. Ni vidis, kiel li interesis siajn kunlaborantojn al la marŝado de sia komerco, kio ebligis al li sin dediĉi al la proklamo de la homarana rolo de la lernejoj. Ni poste akompanis lin en lia veturado al Turkio sur komerca ŝipo.

Post zigzaga veturado al plej diversaj mediteraneaj havenoj, Malto, Aleksandrio, Smirno, la ŝipo fine atingis Dardanelojn. Tiu plurtaga vojaĝo permesis al Jacques Mühlethaler meditado pri la celo mem de la entreprenita rondveturado.

Stranga deziro : iri en Turkion por paroli al la ŝtatestroj kaj ĵurnalistoj pri la rolo, kiun devus ludi la lernejoj por la konstruo de la paco !

Kial Turkio kaj ne alia lando ? Eble hazardo ! Jacques mem ne ekzakte sciis. Ĉu antaŭsento pri komprenemo, kiu lin atendos ?

La vivo estas ofte farita de tiaj hazardoj. Estis necese ekbatali. Jacques turnis siajn rigardojn al tiu lando. Poste li vizitos aliajn ŝtatojn. Li decidis sisteme kontakti la lernejestrojn en plej diversaj landoj por provi aŭdigi la tro ofte neaŭdatan voĉon de la homaranismo. Turkio havos la honoron esti la ekbatalejo de nia paca pilgrimanto.

Pilgrimanto, kiu faras al si multajn demandojn kaj ekzerce sin rediras plej diversajn argumentadojn, serĉante frapajn frazojn, interesajn bildigojn de sia idealo kapablajn tuŝi la estontajn aŭdiencdonantojn.

En la golfeto Eleusis, dum admiro de la urbeto Pireo, li venis al la konkludo tuj skribi leteron al la Prezidanto de la Turka Respubliko. Kaj dum bela stelplena nokto, dum paŝado sur la ferdeko li formuligis al si tiun leteron. La verkado de tiu petado liberigis lin de malkvieteco. La unua ekpaŝo estis nun farita. Li estis sin ĵetinta en la akvon.

La trian de majo, kiam la ŝipo atingis fine la havenon Istanbul, jam estis tro malfrue por eniri. Necesis panei dum la nokto antaŭ la milluma marbordo. Al Jacques ne eblis enlitiĝi. Tro da ideoj abundis en lia kapo. Por la unua fojo li ne plu defendos siajn ideojn en privata rondo amikara, sed antaŭ nekonatoj. Li antaŭvidis malagrablajn kritikojn kaj malafablajn gastigojn. « *Mi tamen ĉiam antaŭeniros* », li sin promesis. « *Mi semos, semos senĉese, ĝis kiam la grajnoj ekĝermos kaj kreskos. Mi scias, ke la semo bonas.* »

Sed la dubo eĥis al tiu optimismo : « *Ĉu mi ricevos aŭdiencojn ? Ĉu mia celo ne tro altas ? Tamen mi scias, ke pacon nur konstruos sen-timuloj* », estis la respondo.

Kiam tagiĝis, tiam li ankoraŭ paŝadis sur la ferdeko, promenante de la pobo al la pruo kaj haltante nur momentetojn por admiri la ĉielon, la maron kaj la teron.

Tiel li vidis ekaperi el la nokta malhelo la senkomparan golfon de Istanbul aŭ Konstantinoplo aŭ Bizanco. Jen nomoj rememorigantaj multajn momentojn de la homara historio.

Dum aperis en la mateniĝo la minaretoj indikantaj, ke Dio tie estas vokata sub la esprimo Alaho, la maron subite plenigis plej diversaj boatoj veturigantaj ne nur homojn, sed ŝafarojn kaj kaprinojn kaj plej neatenditajn varojn. Fine alvenis motorŝipeto. Dogana kontrolo. Rapiidu ! Kie estas la valizoj ? Apenaŭ Jacques trovis la tempon adiaŭi la ŝipanaron, kiu mansignis ĉe la pavezo.

Ĉu li kutimiĝos al tiuj eternaj adiaŭoj ? Amikon oni devas forlasi, kiam la amikeco kreskas. Jen la sorto de la vojaĝanto !

Post dutaga restado en hazarde renkontita hotelo Jacques faris sian unuan malagrablan eksperimenton. Li pensis, ke estis preferinde atendi la aŭdienc-inviton en la ĉefurbo Ankara kaj decidis forlasi Istanbulon. Hotelservisto kaptis liajn valizojn kaj ilin alportis al la pordisto. Kosto : tri svisajn frankojn. La pordisto ilin metis en taksion : denove tri frankojn da elspezo. Taksia veturado : dek frankojn malgraŭ marĉandado ! Sed la valizoj jam estis en la manoj de portisto, nova disputo, nova elspezo : ok frankojn. Ŝipa veturado trans la markolo kostis nur 75 centimojn, sed estis denove devige pagi ok frankojn al portisto.

Vi povas imagi la mienon de nia pilgrimanto je la eksido en la trajno : tiu valiz-portado kostis 32 frankojn : huf, kia lando !

Sed tiu lando ne nur estis plena da turist-ekspluatantoj. Tion tuj povis konstati Jacques Mühlethaler. Du oficiroj sidis en la sama kupeo. Ili ekparolis angle, kaj rimarkante, ke la fremdulo estas franclingvano, tiam ili daŭrigis la babiladon en perfekta franca lingvo. Ili rakontis pri sia lando, pri la pejzaĝo, pri la ŝtata prezidanto, kiun ili admiris, sed ankaŭ pri lia ĉirkaŭantaro, kiun ili abomenis. Ili invitis la svison al manĝo en la trajna manĝejo. Kaj vere ne estis eble ion ajn pagi, eĉ la aperitivon je la alveno en Ankara.

En tiu urbo Jacques Mühlethaler pli atente elektis sian hotelon. En malnova kvartalo li malkovris agrablan malmultekostan restadejon. Nun la vera laboro povos komenciĝi.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. En venonta elsendo vi plue travivos la porpacajn aventurojn de Jacques Mühlethaler. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-